

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

4. VIII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1914.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)
(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = $1\frac{1}{2}$ Sm.

Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezerav sal si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 = $1\frac{1}{2}$ Sm.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio: Dresden. Bankejo Arnhold.)

STRIKO:

Pro striko en la presejoj — preskaŭ 1/4-jara — ne povis aperi regule ĉiuj n-oj la nova jarkolekto 1914. Ni klopodos nun eldoni ĉion mankantan kiel eble plej baldaŭ. — Red.

Stávka:

Poměry v tiskárně, kde po dobu téměř 1/4 roku se nepracovalo z důvodů veřejnosti známých, zavinily, že i toto číslo vychází opozděně. Ačkoliv nelze pro nával práce v tiskárnách vysaditi nyní dvojčíslo, vynasnažíme se vydati další čísla tohoto ročníku dle možnosti nejdříve. Doufáme, že shovívaví přátelé nás omluvili. — Red.

EL TALMUDO.

(Sentencoj elektitaj kaj tradukitaj de Walter Lippmann).

Bonfaremo kaj faroj de amo valoras tiom, kiom ĉiuj ceteraj ordonoj de la Biblio. Bonfaron oni povas doni nur al vivantoj, amon al vivantoj kaj mortintoj, bonfaron nur al malriĉuloj, amon al riĉuloj kaj malriĉuloj — bonfaron sole per la havo, amon per persona ago kaj per la havo.

Kiu estas saĝa? Kiu lernas de ĉiu. — Kiu estas forta? Kiu regas sin mem. — Kiu estas riĉa? Kiu kontentiĝas je sia havo. — Kiu estas estiminda? Kiu estimas la homojn.

Prefere oni mortigu vin ol aliajn. Via sango ne estas pli ruĝa ol sango de via proksimulo.

Ne lasu veni en vian koron la zorgon, ĉar la zorgo jam mortigis multajn.

Kiam eniras la vino, eliras la sekreto.

Estu prefere vosto de leono ol kapo de vulpo.

Se vi akiris scion — kio mankas al vi? — Se mankas al vi scio — kion vi akiris?

Kiu lernas dum sia juneco, al kiu similas tiu? Al skribaĵo sur nova papero. — Kaj al kiu similas tiu, kiu lernas en malujuneco? Al skribaĵo sur flaviĝinta papero.

Kiu studas kaj ne ripetas, similas al tiu, kiu semas kaj ne falĉas.

La pasion, la infanon, la virinon oni karesu per la dekstra mano; se oni ofendis ilin, per la maldekstra.

La homo manĝu kaj trinku sub sia povo, vestu sin laŭ sia povo kaj honoru sian edzinon super sia povo.

Du povas porti trioble tiom, kiom unu.

En la puton, el kiu oni trinkis, oni ne enĵetu ŝtonon.

Tiu donas multon, kiu donas malmulton afable.

Kiu postkuras la honoron, de tiu ĝi forkuras. — Kiu forkuras de honoro, tiun ĝi postkuras.

La homo estis kreita je la sesa tago, por ke li ne estu fiera: ĉar la kulo estis kreita antaŭ li.

La parolo similas al la abelo: ĝi havas mielon kaj pikilon.

La kalumnia lango mortigas tri homojn: la kalumniaton, la kalumnianton kaj la akceptanton de la kalumnio.

Oni ne sidiĝu al la tablo, antaŭ ol oni antaŭmetis nutraĵon al la dombesto.

VATIKANO.

(El la bohema romano „Romo“ de J. S. Machar).

Amaso da melankoliaj konstruajoj. Ne estas en ili stilo, ne estas en ili kontinueco. Kvazaŭ la masonisto, kiu konstruis ilin, estus ankaŭ ilia arkitekturisto. Eniĝas unu en la alian kaj trapenetras ĝian flankajon kaj alia leviĝas super ili, kvazaŭ volante ilin superŝuti. El la fulgumitaj muroj rigardas atenteme malgrandetaj fenestroj, amaso da kamentuboj leviĝas super la malpuraj tegmentoj — jes, se eble dudeko da malnovaj rabistaj kasteloj, sen siaj turoj kaj muregoj kompreneble, kunvenus por babili kaj subite troviĝus en unu miksobulo, ne povus esti la impreso alia.

Kaj ĝi havas dudek kortojn, mil salonojn, kapelojn, ĉambrojn kaj kelke da miloj da kameroj, antaŭĉambroj, koridoroj, ŝtupar-ejoj kaj lokoj, kiuj al tia apartamento apartenas. Kaj en tiu ĉi labirinto vivas maljunulo en blanka kitelo, elektata ĝismorte laŭ inspiro de sankta Spirito de aliaj maljunuloj, de Eminencoj, kiuj portas ruĝan vestajon, maljunulo, al kiu oni diras „plej sankta patro“ kaj se oni skribas pri li, estas lia predikato „lia sankta moŝto“ — al Jesuo Kristo oni diradis „rabbi“, al apostoloj Petro, Paŭlo, Jakobo. Kaj ke la sankta Spirito jam dum konsiderinda vico da jaroj inspiras sole Italon, estas konate.

Ne ekzistas en la mondo palaco, kiu rakontus tiel terurajn aferojn, kiel tiu ĉi loĝejo de maljunuloj en blanka vestajo. Hont-igitaj silentas ne sole la ruinoj de Palatino, sed mem la sidejoj de imperiestroj kaj reĝoj en la malproksimaj landoj kaj la restadejoj de la sultanoj el Azio kaj Afriko. La homa fantazio pensu pri la plej terura okazintajo — ĉio estis ĉi tie, eliris de ĉi tie. Prenu en la manon katehismon kaj elserĉu en ĝi kategoriojn de peko — eĉ ne unu ekzistas, kiun oni ne povus trovi en la historio de papoj. Kaj ne unufoje — centfoje!

Sed la meritoj de la papoj pri la scienco kaj arto en la ĥaosa mallumo de le mezepoko! Kaj iliaj meritoj en la renesanco!

En la mezepoko? Meritoj de la papoj? La monaĥoj en la monaĥejoj iom praktikis la sciencojn, varmigadis siajn malvarmajn, kompatindajn animojn en la sunlumo de la romaj klasikuloj kaj pentradis inicialojn en la brevierojn kaj preĝarojn, vere. Tio estis almozula kompensajo por la granda antika kulturo, ruinigita de kristanismo — sed eĉ tiu ne estis laboro de la papoj. Ne ekzistis tiame la severa centralismo roma, kia estas hodiaŭ kaj la monaĥ-ejoj vivis el boneco de siaj landestroj, kiujn ili ĉiam sekvis, kaj se mem kontraŭ Romo kaj papo, tiam kontraŭ Romo kaj papo. Estis tiel en Germanujo, estis tiel ankaŭ ĉe ni en Bohemujo. La monaĥejoj fariĝis kovejo de mallaboremaj diboĉuloj, ĉarlatanoj kun la relikvoj, vendistoj de indulgencoj, kaj ili malspritigadis la

tutajn regionojn vastĉirkaŭen. Kaj kontraŭ scienco, arto, progreso kaj voĉoj de pliboniganto la papismo tuj montris sian veran vizaĝon. Arnold el Brescia mortis sur la ŝtiparo same kiel Giordano Bruno, Dante ilin malamegis, Galilei estis de ĝi turmetita, Hus kaj Savanarola mortis en flamoj — la tuta mallumo de la mezepoko havas unu solan fonton, kaj tiu estas: papismo, kaj kie estas iom da lumo, ĝi estas ŝtiparo de la papismo flamigita, kaj kie estas iom da varmo, ĝi estas varmo de la homa sango de ĝi verŝita...

Kaj renesanco? Kaj ĝia arto? Oni legas pri la konstruaĵoj farataj en Romo de Siksto IV., pri la florentinaj pentristoj, laborintaj super verkoj menditaj de tiu sankta Patro, vere, sed tiuj malĉastaj domoj, kiujn la 'sama sankta Patro mem elkonstruis kaj kiuj donis al li ĉiujaran profiton da 20.000 dukatoj — tiuj malĉastaj domoj metas en ombron ĉion. Kaj oni plue legas pri Aleksandro VI. kaj vidas sole tiun teruran familion de Borgia, kiu nenion konsideris tiom fremda, ke ĝi ne nomu tion sia; ponardoj, mortigistoj, veneno, fremda havajo, sangadulto, raboj, brokantado pri objektoj la plej sanktaj kaj la plej malnoblaj, diabla cinismo en ĉio — kaj tia sankta Patro kondamnas asketon Savanarola al brulmortigo. Kaj poste: Julio II. kaj Leo X. ĉu ili estis entute kristanoj? Ankaŭ tiu ĉi demando estas permesita, ĉar la papismo staras antaŭ du juĝistaroj: antaŭ la homa kaj la dia, antaŭ tiu de la historio kaj tiu de la moralo, kaj se unu tiun aŭ alian senkulpigos, la alia devas lin kondamni. Kia naiva profundeco kaj trafa takso de si mem kaj de papo Julio II. kuŝas en la ekĝemo de imperiestro Maksimiliano I., la lasta kavaliro: „Deus aeterne, nisi vigilares, quam male esset mundus, quem regimus nos. ego miser venator et ebriosus ille et sceleratus Julius"! (Se vi, Dio eterna, ne maldormus, kiel malbone fartus la mondo, kiun regas ni. mi, mizera ĉasisto kaj tiu ebria kaj senmorala Julio!)

Ebriosus et sceleratus — du adjektivoj kaj en ili estas vivo, karaktero kaj juĝo pri tiu anstataŭanto de Kristo sur la tero! Kaj Leo X.! Tiu aŭtoro de la nemortebla sentenco pri la „Kompatinda homo de Nazareto"? Kiel bela idolano li estus estinta, se li ne estus papo! Dum lia regado eĉ la oferaĵoj estis ja bruligataj. Al Jovo Kapitola la plej alta kaj la plej bona! Eble estus povinta fari tiu ĉi plej granda pekulo de la renesanco unu aferon: forigi la dekkvincent-jaran erardoktrinon kaj trompadon de la homaro, la malbenindan galilean heredaĵon — li havis por tio sufiĉe da forto kaj da sincereco, sed li ne havis seriozan voĉon de konscienco kaj senton de respondeco, aŭ li havis idolismon de antika homo, sed tro venenitan, tro indiferentan.

Kaj dum Julio II. venis en Romon la germana monaĥo Luther. Li observadis ĉion per sia malvarma norda intelekto kaj

ĉion kondamnis, ĉar li trovis en ĉio sole regnon de Antikristo. Li revenis en Germanujon kaj por Romo komenciĝis tempo de terura krizo. Ĝi perdis nacion, kiu estis siatempe ĝia ĉefa subteno, ŝildo kaj glavo: Germanojn. Romo perdis ĝin, sed pro la perdo ĝi rekonsciiĝis: ĝi enprofundiĝis en sin mem, faris malgrandan penton, sin apogis je la ordeno de Jesuitoj kaj klopodis konservi, kio estis konservebla. Kaj renesanco en la arto mortis . . .

F.

FELIETONO

Kiel belaj estus la rezultatoj de la propagando, se ĉiuj Esperantistoj laborus en interkonsento kaj komune super la sama ideo! Tiel opinias certe pli ol unu samideano, precipe, se li estas novulo en niaj vicoj, je kiu efikas ankoraŭ troa idealismo de la nova por li sento esperanta. Vere, ĝi estus same bela, kiel vivo sen krimuloj, sen puninduloj, kiel vivo en paradizo, en kiu niaj prapartoj povis rilati amike eĉ kun la plej sovaĝaj bestoj. Sed la tempo ŝanĝas la mondon kaj la homojn. Hodiaŭ en ĉiu lando, en ĉiu urbo estas vastaj domoj, tre vastaj, por individuoj danĝeraj, por multe da tiaj indivuoj — kaj tiuj domoj estas plenaj. Kaj kun progresanta kulturo oni konstruas pli multe da tiuj pundomoj! Ĉu iu kuraĝas opinii, ke estas neaprobinda aresti krimulojn kaj ilin izoli de la honesta societo? Ne, certe ne. Kaj nun kelke da vortoj pri la vivo en Esperantujo: Antaŭ unu kvaronjarcento, kiam sole amiko al amiko rakontis pri la nova ideo, oni ne sentis bezonon multe atenti pri la speco kaj karaktero de anoj de la „nova nacio". Preskaŭ ĉiu estis konata jam kiel amiko samnacia kaj — fariĝinte Esperantisto — li fariĝis tieldire duobla amiko. Post 25 jaroj la situacio ne restis sen ŝanĝo: samideano fariĝas nun iu ajn, kiu pro scivolo aĉetas kaj trastudas lernolibron. Jen, Esperanto fariĝis propraĵo de ĉiuj, de bonuloj kaj — nebonuloj. Por pruvi, ke aŭtoro de ĉi tiuj linioj ne estas la unua, kiu parolas pri la ebleco trovi inter samideanoj ankaŭ kelke da „nebonuloj", estu citita frazo el la dua kongresa parolado, kie dr. Zamenhof diras, ke ankaŭ persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj, estas nomata Esperantisto. La ekzemploj ne estas maloftaj. Se malbona karaktero kaj kondamnindaj faroj de tia nova samideano devigas la societon, kiun li elektis sia nesto, ke ĝi eksigu lin, tio estas laŭregula puno kaj aliflanke sindefendo antaŭ malbonulo. Tiel kondutas ĉiu societo — ankaŭ neesperantista, kiu volas konservi sian nomon pura kaj garantii al siaj honestaj membroj samspecan kunularon. En la kutima vivo estas tia morala ekzekuto konsiderata justa kaj aprobinda, sed en la vivo esperanta — ho! nova leĝaro, nova, sed por la moderna vivo ne-

taŭga, ia „esperantisma“ paragrafo estas tuj citata de kelkaj samideanoj: sub la influo de homar-amo ili rekomendas ĉion pardoni (sed sole se la kulpulo ne atakis ilin mem! — stranga, ĉu ne vere!) ili ĉiam predikas pri la pacdevizoj de la plej nobla kristanismo kaj kvazaŭ protektas la krimulon, pri kies kulpo cetere ili mem eldiras vortojn de la plej severa kondamno.

Inter la esperantistaro elkreskis kelke da tiaj „pacanĝeloj“, kiuj aŭ neniam havis okazon vidi, kiel la mondo kondutas rilate la krimulojn, aŭ volas per sia ĉiuflanka pardonemo garantii al si lokon de la tria inter du batalantoj. Kaj se tia eksigito trovas, ke Esperantujo havas aliajn leĝojn ol la vivo kutima, li ne kaŝiĝas por penti kaj honti, sed li fidas je morala subteno de la „pacanĝelo“ kaj promesas venĝon, pri kiu la lin favoranta pardonemulo eĉ ne sonĝas. Kaj laŭ ebleco li tuj sin venĝas: la unua paŝo estas — fondi novan societon, kies celo estos disigi la fortojn, subfosadi teron sub la malnova centro, el kiu li estis forekspedita kaj per kalumnioj nigrigi la honoron de siaj malnovaj samideanoj. Kelke da anoncoj aŭ flugfolioj havigas por lia societo areton da membroj kaj — li triumfas inter ili. Sed post kelka tempo liaj novaj samgrupanoj perdas la toleremon aŭdi de li anstataŭ pri Esperanto sole atakojn kontraŭ personoj kaj plejparte ili foriras, preferante tute evitadi la societan vivon; kaj nia „organizanto“ — fidante je „pacanĝeloj“, serĉas kun siaj lastaj vojon tien, el kie li estis forsendita kaj ne volante rememoriĝi pri siaj insultoj, li trude sin puŝas en vicojn de honestuloj, kontraŭ kies poresperanta laboro li konspiris komploton.

Kaj se oni laŭjuste ne volas lin koni, li furiozas, dirante, ke mortis inter Esperantistoj deziro kune labori! Tiaj okazintajoj havas lokon precipe en nia Esperantujo — ĉiulande; kaj se iu diros, ke tio malhelpas la sukceson de propagando, mi respondas: kulpaj estas unuavice la „pacanĝeloj“, kiuj, ne volante publike kondamni kaj laŭmerite eviti unu aŭ du kulpulojn, prefere kondamnas sian propran societon, riproĉante al ĝi neesperantisman animon kaj fine — mem eksiĝante pro nesukceso de sia laboro pacifisma kaj fondante ofte novan societon — hipokrite plendas, ke estas bedaŭrinde neeble kunlabori kaj ke la rezultatoj de la propagando estus pli belaj, se ĉiuj Esperantistoj laborus en interkonsento kaj komune super la sama ideo!

Pri **la tasko de niaj societoj** skribas Dr. A. Czubryński en „Pola Esp.“ Interalie li diras: La societoj, naskiĝinte dum la lasta „kongresa periodo“, havos en estonteco limigitan daŭron; ilian rolon oni ne trotaksu. Ju pli multe estos da Esperantistoj, des pli superfluaj fariĝos la societoj precipe, post kiam la registaroj metos

Esperanton en la programon de la instruado. Oni ankaŭ povas jam nun konstati ian krizon en multaj el ili: la movado transpasis la limojn de nura propagando, la membroj ne kontentiĝas plu per la malnovaj prelegoj pri la lingvo, oni deziras apliki sian scion sur pli vasta kampo. Ekster la societo, kiu fariĝas nur centra riverujo, fluas multe da riveretoj de la vivo esperanta, kiuj tieldire rete akvumas la surfacon de la publika vivo. Ankaŭ la propagando devas foje tuŝi sian limon: la publiko scias pri Esp., aprobas ĝin, sed tamen multloke — unu atendas la alian, oni ne ekstudas ĝin, oni atendas... Estus tial rekomendinde apliki novan taktikon: oni faru temo de la diskutoj por la kunvenoj modernajn okazintaĵojn, eltrovaĵojn kaj ilian influon je la vivo. „Jen la sango por la malplenaj, anemiaj vejnoj de la esp. socitoj".

SEN TITOLO.

El Eneido. Kiel specimenon de la esperanta traduko ni citas: (*Ovidii Metamorphoseon lib. VIII., v. 183-187*):

Daedalus interea, Creten longumque perosus
Exilium, tactusque loci natalis amore,
Clausus erat pelago. Terras licet, inquit, et undas.
Obstruat: at coelum certe patet; ibimus illac.
Omnia possideat, non possidet aëra Minos.

(*Traduko de Dr. Vallienne*):

Dume Dedalo, tedita pro longa ekzilo malamas
Landon Kretujan: instigas lin amo al lando naskiĝa.
Sed enfermita li estas de maro: „Li teron kaj ondon
Povas obstrukci, sed estas ĉielo: mi per ĝi forkuros.
Ĉion posedas Minoso, sed li ne posedas aeron".

Abelveneno kontraŭ reŭmatismo. Jam de longa tempo estas konate, sed ne ĉiuj homoj tion scias, ke la abelveneno havas sanigan forton. La sperto pruvis, ke precipe la reŭmatismaj doloroj povas esti per ĝi kuracitaj. Hodiaŭ penetris jam tiu ĉi populara medikamento en la kuracistan praktikon kaj ĝi servas kontentige. Estas homoj, kiuj kontraŭ la abelveneno estas imunaj, kiuj ĉe la piko ne sentas doloron, sed tiu ĉi imuneco ne estas ĉiam plena. Tiaj homoj ŝveliĝas post la piko almenaŭ sur la lokoj, kie estas amasiĝinta la reŭmatisma infektiĝo. Laŭ tio oni povas ankaŭ konjekti, ke homoj, kies korpo estas speciale kontraŭ la abelveneno sentema, estas inklinaj al reŭmatisma malsaniĝo. Prof. K. Sajo rakontas, ke infano, kiu dum kelke da jaroj ne povis pro reŭmatismo stariĝi sur la piedojn saniĝis nelonge post kiam ĝi estis pikita de abeloj. Ankaŭ maturaj homoj simile saniĝis.

Estas tiucele ofte uzata la mielo, sed nun ĝi estas bedaŭrinde elprenata pli frue, ol la abeloj glufermis la ĉelojn kaj per tio estas deprenata de la mielo la sanigeco, ĉar la abeloj senpere antaŭ la fermo de la ĉelo aldonas en la mielon krom la formika

acido ankaŭ sian venenon, kaj tiu estas la kondiĉo de saniga forto de mielo. Sed ĉiam oni devas memori, ke la okuloj devas esti gardataj de la abela veneno! — Estas nun vico je kuracistoj por esplori la aferon sur bazo de scienco.

Siberia frosto. Malvarmo, kiu regas ĉe ni dum vintro, eĉ de malproksime ne estas komparebla al frosto de aliaj landoj. La plej malalta temperaturo estas en nordaj regionoj de Azio kaj la siberia frosto fariĝis proverba. Jam en la okcidentaj partoj de tiu ĉi kontinento estas ofte 60 gradoj sub nulo. Sed la plej kruela frosto, notita sur la terglobo, estis 70 gradoj en urbeto Verĥojansk. Ni, kiuj konas 12 aŭ 15 gradojn sub nulo, apenaŭ povas al ni prezenti, kion tia kreviga frosto signifas. Ni konas ĝin sole laŭ rakonto de tiuj, kiuj ĝin travivis. Esploristo Middendorf skribas: La hidrargo jam delonge firmiĝis je metalo tranĉebla kaj forĝebla kiel plumbo, la fero estas facile rompebla kaj la ferstangoj rompiĝas kvazaŭ vitraj; la ligno estas pro la entenata malsekeco pli malmola ol fero kaj rezistas al hakilo, tiel ke oni povas fendi lignon sole tute sekan. La paŝoj sonas sur rigida neĝo kaj el praarbaro aŭdiĝas akraj pafoj: la arboj krevas de frosto kaj la branĉoj falas sur ŝtonrigidan teron. Kiel kanonado ripetiĝas subtera bruo, tremiganta la teron, kiun kaŭzas la krevanta glacio. Apenaŭ oni povas kredi, ke bestoj kaj homoj povas vivi en tia manko de varmo.

Provizon de vortoj ĉe knabo sesjara esploris P. Krause laŭ tiu ĉi skemo: 1. Substantivoj kaj verboj: loĝejo kaj laborejo, dormejo, kuirejo, antaŭĉambro, ŝtuparo ktp., veturilremizo, tolajlavejo, vestaro, bestoj, kreskaĵoj, familio, strato, hejmo kaj la cetera mondo. Lernejo, okupado, ĉielo, manĝado kaj trinkado; ĉe la ludo; ĝardeno kaj korto, homa korpo, materioj, tempo. 2. La ceteraj partikuloj. Li trovis, ke la vortaro enhavas sole 930 nomojn de objektoj, 520 verbojn, 100 adjektivojn, 4 artikolojn, 35 pronomojn, 6 konjunkciojn, 30 adverbojn, 50 numeralojn, 20 prepoziciojn, 5 interjekciojn — sume 1700 vortojn.

En la 19-a jarcento okazis **milito** ĉiun trian jaron, ne kalkulante grandan kvanton da malpli gravaj bataloj kaj revolucioj.

* * *



PRVNÍ POMNÍK ESPERANTA

odhalený o svatodušních svátcích ve FRANTIŠKOVÝCH LÁZNÍCH.

Z CELÉHO SVĚTA.

X. Kongres Esperantistů v Paříži (2.—10. srpna 1914). Počet přihlášek do konce června: **3200.**

Společný odjezd z Prahy do Chebu a dále zvláštním vlakem **do Paříže**: Naši přátelé z Prahy a z vých. Čech, kteří chtějí použíti zvláštního vlaku vypraveného klubem esp. z Chebu dne 1. srpna, mohou dostati lístky za sníženou cenu též **na trati** Praha-Cheb, přihlásí-li se **ihned** u M. U. Dr. Ad. Bischitzkého v Praze V. Mikulášská tř. 12., který s ochotou sdělí bližší informace. (Viz str. 42. Č. Č. E.).

Ke kongresu byl vydán **esperantský průvodce po Paříži** redakcí časopisu La Movado: „Paris en naŭ tagoj". Cena 50 ctm (S.n. 0·200) vypl. (Bd. St. Marcel, 61.).

Ubytování návštěvníků kongresu ochotně obstará vydavatelství časopisu „Le Monde Espérantiste" (Paris, 3. rue Sophie-Germain), jež má v záznamu na 200 bytů po 3—4 Fr. Při pobytu alespoň týden po 2—3 Fr. (splatno osobně v Paříži). Přihlášeným doprovod z nádraží do bytů, sdělí-li hodinu příjezdu.

V Paříži bude v době sjezdu otevřena **výstava loutek** v národních krojích z nejrůznějších zemí. Loutky byly získány většinou pomocí Esperanta. (O dalších zásilkách třeba dříve jednati písemně se sl. Laure de Laporte, Paris, Bd. de l'Hôpital 50.).

IX. Kongres německých Esperantistů byl zahájen o svatodušních svátcích **v Lipsku** za účasti zástupců státních, vojenských i městských a 600 hostí. Schůzím byly vyhraženy místnosti paláce knižního průmyslu a sjezdový pavilon na výstavě. Všem členům byly rozdány cenné publikace: E. ein Kulturfaktor IV. (bohatá sbírka praktických služeb, které Esperanto vykonalo), esp. průvodce po Lipsku, něm. pamětní spis věnovaný městskou radou a j. Legitimace opravňovala k volnému vstupu do výstavy grafických umění po tři sjezdové dny. Na výstavě došel zasloužené pozornosti samostatný pavilon „Esperanto", kterým naši němečtí přátelé triumfují na hlavní „třídě národů". Velmi vkusná úprava vystavených sbírek knih, časopisů, oběžníků, fotografií, esp. nálepek (přes 1000!) statistických přehledů, map a pod. upoutala každého návštěvníka. Serie nálepek a pohlednic „E.-pavilono" zůstane milou upomínkou na tuto první naši veřejnou exposici. (Nálepky výstavní vydané ve 12 jazycích, vyšly také s textem esperantským). V německých časopisech vyšlo za loňský rok přes půl druhého tisíce článků o Esperantu. — Král. esper. knihovna v Lipsku, jejíž ředitelem jest Dr. Schramm, jest zdarma přístupna veřejnosti a půjčuje knihy i na delší dobu.

Esperantská hostina pořádaná každé čtvrtletí **v Paříži** (v hótelu Moderne) stala se 12. května dostaveníčkem vynikajících osobností světa francouzského; mimo několika hostí z ciziny, kteří zavítali právě do Paříze, súčastnili se: Princ Roland Bonapart, gen. důlní inspektor Ch. Lallemand, generál Sebert, členové Institutu, dále Gariel, člen Lékařské Akademie, Boirac, rektor dijonské university, Mouton, chef policejního úřadu, E. Archdeacon a hrabě de la Vaulx, známí letci, konečně celá řada Esperantistů pařížských. Jmenovaní hosté, kteří již delší čas zajímají se o Esperanto a účinně je ve svém okolí propagují, pronesli přípitky svědčící o jejich trvalém zájmu na výsledcích našeho hnutí. — Koncem května konal francouzský **svaz vzduchoplavecký** slavnostní schůzi na pamět 50-leté propagandy aviatiky. Za předsednictví presidenta re-

publiky pronesli účastníci přednášky a zdravice, při nichž někteří neopomenuli uvésti na program rozhovoru Esperanto. Byli totiž mnozí z nich stoupenci našeho hnutí; krom gen. Seberta byli přítomni: Archdeacon, lieut.-colonel Renard, Berthelot Soreau, Chassaigne-Goyon, Deutsch de la Meurthe, Eiffel, dr. Loisel, F. David a j., kteří již častokráte zdůraznili význam Esperanta pro své mezinárodní styky.

Zamenhofova ulice. Přední revue francouzská „Les Annales politiques et litteraires" píše v posledním čísle o slavnosti spojené s pojmenováním ulice Zamenhofovy v normandském městečku Sotteville-lès-Rouen: „Již po druhé ve Francii byla pojmenována ulice jménem genálního tvůrce Esperanta (po prvé v Limoges), jehož dílo bude svého času rovnocenným s vynálezem Guttenbergovým a Edisonovým. Městská rada Sottevilleská usnesla se na návrh předsedy místního klubu esper. projeviti tak veřejně úctu tomuto novému dobrodinci lidstva, což stalo se slavnostním způsobem u příležitosti 7. sjezdu Federace Normandských Esperantistů. — Již několikráte, během posledních let, byl dr. Zamenhof oficielně vyznamenán: r. 1905 byl jmenován rytířem Čestné legie, r. 1909 udělen mu řád Isabelly Katolické a nedávno zvolen čestným členem vědecké fakulty v Peru".

V. Katolický kongres Esperantistů koná se letos **v Lurdech** pod patronací mons. Schöpfera, biskupa tarbeského a lurdského (12.—17. srpna). Až dosud konány sjezdy v Paříži, La Haye, Budapešti a v Římě. Na esp. plakátech tohoto kongresu jest sedmi jazyky uvedena poznámka, že jedinou jednací řečí bude opět Esperanto. Přihlášky přijímá F-ino M. Larroche, Paris, 55, rue de Vaugirard. — Rovněž na X. kongresu pařížském uspořádají katolíci své schůze a bohoslužby za součinnosti pařížského kard. arcibiskupa. Mše a kázání v Esperantu bude se konati dne 2. srpna v kathedrále Notre-Dame, druhého dne v basilice Sacré-Coeur na Montmartru; večer jest na pořadu propagační schůze za předsednictví kanovníka Chapeau s franc. přednáškou Cl. Colase: Katolíci a jazyk mezinárodní. — Katoličtí Esperantisté vydávají již několik časopisů: Espero Katolika, ústř. orgán, L'Espérantiste Catholique, orgán franc. svazu, Nederlanda Katoliko a Kataluna Katoliko. V Paříži byla založena r. 1909 kancelář (Montmagny, 7. rue des Marroniers), která jest střediskem propagandy Esp. mezi katolíky. Tamtéž lze objednati publikace esperantské: La Kvar Evangelioj, Katolika preĝaro, Imitado de Jesu Kristo, Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj, Katolika Kantikareto. Fabiola, Ofero de monako, Kio estas la eklezio de Kristo? Johano de Fugerus. Unua Katekismo, Funebra parolado, Spirita juvelaro. Ve vydávání katolických děl se pokračuje.

Georg Davidov v Saratově připravuje za součinnosti sl. A. Sharapovy (Onex près Genève, s-o Birukoff) serii ruských brožur o Esperantu ve službách 1. slepců, 2. vegetarismu, 3. křesťanských jednot, 4. pacifismu a 5. ženského hnutí. První z nich bude obsahovati krom seznamu tištěných děl pro slepce (přes 100) též úplný katalog knih esper. ručně opsaných písmem Braille-ovým.

Členům **londýnského** spolku elektroinženýrů uspořádal člen Mezinár. vědeckého svazu esper. J. Gueritte přednášku o Esp., v níž zdůraznil význam tohoto jazyka pro inženýry, jichž pole působnosti jest mezinárodní.

Italský měsíčník „L'Esperanto" (s-o A. Paolet, S. Vito al Tagliamento) přináší v každém čísle zajímavé **lekce** pro studium

klasických i moderních řečí pomocí Esperanta! V posledním čísle obsahuje druhou úlohu portugalštiny, třetí úl. latiny a 31. úl. italštiny. (Výslovnost latiny jest však vykládána — podle italštiny). Jak známo, vyšla před několika lety esperantská učebnice francouzštiny od Bouleta a v Cambridgeské kongresní knizebyla uveřejněna stručná učebnice angličiny.

Cís. **Japonská** Meteorologická Společnost uveřejňuje v některých číslech svého orgánu Kiŝro Ŝuŝi vedle článků japonských též esperantské, psané domácími učenci. V poslední době vyšly tamtéž články „Glor-krono en Rizkampo“ a prof. Hasegana: „Eksperimento pri tertremado kaŭzita de veturanta vagonaro“. Prvý článek, napsaný prof. Fučino a Idzu vyšel v angl. časopisech Nature a ve věstníku král. met. spol. britské s pozn. o jeho esper.-japonském původu.

Čínský týdeník „La voĉo de la popolo“ věnuje v každém čísle čtyři strany článkům psaným Esperantem. Vyžádejte si uk. číslo: „Sifo“, Box 913. U. S. Postal Agency, Shanghai. Azio. — Čínský svaz esper. čítá již přes 1000 členů.

Z Ameriky: Ředitelství státní knihovny v Maranhão založilo zvláštní sekci pro esperantskou literaturu. — Časopis poštovních úředníků v Rio de Janeiru uveřejňuje kurs Esp. — Ve mnohých městech brazilských byly zahájeny kursy a místní časopisy přinášejí časté a dlouhé články o našem hnutí, zvláště o V. kongrese brazilských Esp.

S úspěchem dochází Esperanto pochopení v Ústředním výboru mezin. svazu křesťanských **jednot mladých mužů,** který čítá ve 44 zemích přes million členů. Informační tiskopisy této korporace byly vydány již také v Esp. Potřebné pokyny k uspořádání přednášek a kursů v sídlech jednot sdělí Paul Hübner, red. „Dia Regno“ (esper. orgán jmenovaného svazu) v Dellbrückenu u Kolína/R. (Německo).

Na měšť. školách ve XX. okresu **ve Vídni** konaly se dne 3. července veřejné zkoušky z Esperanta pod vedením prof. Kaftana. Celkem zkoušeno 24 žáků.

Sjezdu rakouských Esperantistů ve Františkových Lázních účastnilo se přes 300 osob. První den byla otevřena esp. výstavka v Parkhotelu, večer uspořádán uvítací večer s přednáškami pp. Hechtla a Glücka. V zahajovací schůzi konané po katolických bohoslužbách (s esper. kázáním dp. Blanka) pozdravil hosty starosta města E. Loimann. Ministerstvo války bylo zastoupeno plukovníky Englem a Röhrem a několika důstojníky. Dr. Ghez z Terstu proslovil propagační přednášku, po níž odebrali se účastníci k odhalení pomníku Esperanta, postaveného v městském sadě. Ostatek dne vyplnila společná hostina, návštěva lázeňského sadu a města. večer pak zahradní slavnost. Druhého dne jednáno o ustavení rakouského svazu Esperantistů a zvolen za místo příštího sjezdu Prešburk. Po skončení slavností odjeli někteří hosté do Lipska, kde sešli se s účastníky sjezdu něm. Esperantistů.

Časopisy esperantské obsahují nyní téměř vesměs zprávy o výsledcích **národních sjezdů;** ze všech vidno, že hnutí naše jest na správné cestě a že čím dále tím více získává půdy v rozhodujících kruzích. Tak na př. sjezdu německého v Lipsku súčastnilo se na 630 hostí (značná část byla přítomna též schůzi U. E. A.); současně konány schůze studujících, učitelů, poštovních a železničních úředníků, katolíků atd. Dar 12.000 korun, kterým poslanec Steche, zástupce svazu saských průmyslníků a „Hansabundu“

usnadnil značně práci propagatorům Esperanta v Sasku, jakož i výstavní pavilon E. staly se předmětem rozhovoru též širší veřejnosti. Na sjezdu bylo zastoupeno 10 národností. (Ve svazu něm. Esper. jest nyní sdruženo 179 spolků). — Stejně zajímavé jsou zprávy o III. sjezdu Esperantistů maďarských v Segedině. Na 250 hostí ze 35 měst bylo uvítáno zástupcem města na radnici. Městská rada věnovala pořadatelstvu 1000 K subvence. Z usnesení schůzí jmenujeme založení nového střediska pro jednotlivce, jimž byla by dána k disposici okružní knihovna (podobně jako „Liga českých Esp.“). — V Belgii navštívilo národní sjezd v Mecheln (Malines) na 200 osob. Městská rada propůjčila účastníkům divadlo. — Švýcarský svaz svolal kongres do St. Gallen, normandský do Sotteville-les-Rouen (200 účastníků). Sjezd federace Bourgogne-Jura konal se v Bourgu, jehož starosta jest též Esperantistou. Na všech jmenovaných sjezdech zasedaly zkušební komisse; v posledním uděleno bylo cestovní stipendium 300 K p. R. Brétillotovi z Besançonu, který podnikne na podzim esp. přednáškovou cestu do Švýcar a Italie.

Institut d'études françaises de Touraine, jehož předsedou jest rektor Akademie v Poitiers, pořádá za součinnosti university v Poitiers **prázdninové kursy** francouzštiny pro cizince. Esperantská a francouzská oznámení o těchto kursech zašle Esper. klubo en Tours: sekr. s-o Patin, 40. rue Michelet.

Esperantský svaz obchodníků a průmyslníků **v Paříži** zamýšlí uspořádati během kongresu výstavu zboží, při níž bude zřízena i prodejna. Vystavovati mohou pouze firmy, které užívají Esperanta ve stycích obchodních. Bližší zprávy podá Komerca kaj Industria Asocio, Paris.-X. Esperantista kongreso. Stálá informační kancelář tohoto svazu jest v ulici rue du Faubourg St. Martin 43. (I. Passage Brady) v Paříži; tamtéž stálá výstava předmětů a publikací vztahujících se k Esperantu, čítárna, prodejna esper. spisů a knihovna. Také se tam vyučuje Esperantu každodenně večer. Pro členy svazu jest vyložen seznam uprázdněných míst.

CIRKULEROJ.

Esperanto-kongreso en la koro de Germanujo.

La 22. kaj 23. de aŭgusto en la bela urbeto **Eberswalde** (tre proksime de la metropolo Berlino) okazos la 6. Ligotago de la Brandenburg-Pomera Esperanto-Ligo. La famaj vidindaĵoj de la mondurbo **Berlino** certe allogos multajn samideanoj, kiuj, partopreninte la Parizan kongreson, reveturos tra centra Germanujo. Por niaj en- kaj eksterlandaj geamikoj ni preparos bonan akcepton kaj spertan gvidadon en Berlino. La partopreno al tiu kongreseto postulos malIongan kaj agrablan veturon. La ĉarma situacio de la supre nomita kongresurbeto pleje rekomendas aliĝi al tiu kongreso kaj al komuna ekskurso de la grandurbaj kaj provincaj Esperantistoj. Negermanoj bonvolu peti informojn pri senpaga aliĝo. Adr.: s-o Ernst Wichert, Charlottenburg, Scharrenstr. 32/a.

Vi povas ricevi senpage grandan kvanton da Esper. propagandiloj se vi skribos al: Grosse Ausstellung 1915 en **Düsseldorf** (Germanujo). Postulu tuj 100 ekz. de la ĵus aperinta eldonaĵo. Vi ne nur helpos al ni favorigi tiun ĉi korporacion, vi ankaŭ ricevos multe da materialo por via propagandado. Sendu poŝtkarton!

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Do svazu **jednotlivců** „*Ligo de Bohemoj Esperantistoj*“ přihlásilo se již 40 členů jimž jest zasílán zdarma Č. C. E.; mají k disposici knihovnu o 150 svazcích. Nově přibyly knihy:

č. 151. Zamenhof: *Deklaracio pri Homaranismo* (14 pĝ.).

č. 152. L. Tolstoj: *La Morto de Ivano Iljič* (126 pĝ.).

č. 153. R. de Saussure: *La vort-teorio en Esperanto* (78 pĝ.).

č. 154. Fauvart-Bastoul: *Pri la gramatika specifikeco de la fundamentaj radikoj* (16 pĝ.).

č. 155. Dr. Fleischer: *La difino de la dattago en la kristana epoko* (20 pĝ.).

č. 156. W. Winsch-P. William: *Pri la kredo al mirakloj*; natura klarigo de la bibliaj mirakloj (32 pĝ.).

č. 157. *Carlo Bourlet*: biografio (13 pĝ.).

č. 158. Centra Oficejo: *Naŭa univ. kongreso de Esperanto en Bern 1913* (163 pĝ.).

Adresa knihovny: Sinjorino Eliška Kočvarová, Rokycany 33.

Klub Esperantistů v **Rakovníku** připravuje sběratelskou výstavku, k níž byla mu městskou radou propůjčena místnost a udělena subvence 50 K. Výstavka koná se od 27. září do 4. října t. r. Výbor žádá všechny spolky esperantské i jednotlivce, aby k účelu tomu zapůjčili své sbírky knih, časopisů, dopisnic, známek, nálepek, i motýlů, brouků a jiných předmětů, které by do rámce výstavky spadaly. Zásilky mohou býti zaslány nevyplaceně na adr. jednatele p. Jar. Pokorného (Rakovník, Václavská ul. 481, „Celestýnka“), nebo budou osobně vyzvednuty i odevzdány. Propagační nálepky výstavní zasílají se 100 kusů za 30 hal., 1000 kusů za 3 K. — Doporučujeme vřele všem přátelům aby všemožně podporovali snahu klubu rakovnického a oznámili mu do konce srpna rozsah sbírek, které mohou zapůjčiti.

E. K. en **Loštice,** havanta 18 membrojn, aliĝis al B. U. E. La kunvenoj okazas ĉiumerkrede en hotelo „Coufal“. Prezidanto estis elektita s-o M. U. Dr. Lauda. Kiel delegitoj por B. U. E. s-oj B. O. Straka kaj B. Verner.

* *

VII. Kongreso de Esperantistoj el **orienta Bohemujo** okazis la 21. de majo en Přelouč, kie kunvenis 50 gastoj el la ĉirkaŭajo kaj el Praha; la kunvenon malfermitan de la prezid. s-o Vosáhlo prezidis s-o Dr. Schulhof. Delegitoj de kluboj el Hradec Králové, Nymburk, Kutná Hora, Pardubice, Chrudim k. a. raportis pri la loka movado. La proksima kongreso okazos en Hradec Kr. Post komuno tagmanĝo vizitis la gastoj la urban muzeon kaj partoprenis posttagmeze „akademion“, ĉe kiu krom tre bonaj muzikpecoj pezentis la samideanoj el Kutná Hora unuaktan teatrajon „Nova sporto“, trad. de f-ino Mrázková. Kun intereso estis vizitata la ekspozicio kiu altiris ankaŭ atenton de la gastoj. Paŝtkartoj kun fotografajo de la ĉeestintoj oni mendu ĉe aranĝintoj de la kunveno laŭ adreso: S-o Jan Pour en Přelouč.

„**Migranta karto esper.**“ estis eldonita de s-o K. F. Ludvík, sekr. de E. K. en Přelouč. Prezo: 10 ekz. 1 K., 50 ekz. K 2·50. Pagu per aŭstriaj p. m. — La karto revenas al la ekspedinto, kiu sendas poste kiel rekompencon po il. k. al la kvar adresatoj, inter kiuj la karto migris.

Esperanta **Gvidfolio** tra **Klatovy** jam aperis kaj estas ricevebla ĉe s-o Fr. Albert, městský účetní en Klatovy (poŝtmarko!).

PODVOD.

Pod tímto zcela správným názvem uveřejnila red. „La Kulturo“ tuto zprávu: V „Kolibří Bibliotece“ (Lorenz v Třebíči) vyšla knížečka pod páskou s nápisem „Esperanto“. Kdo si ji koupí a roztrhne pásku, shledá, že byl napálen, neboť knížka nemá s Esperantem nic společného, nýbrž obsahuje hantýrku francouzsko-esperantskou a jest sepsána pověstným Kajšem na Moravě. Patří podobní lidé do blázince nebo do káznice?“

Poznamenávám k tomuto p. Kajšovu pokusu vnutiti bezcenný plagiát Esperanta české veřejnosti a k jeho nešlechetné taktice:

Jakmile jsem spatřil jmenovanou knížku s titulem „Esperanto“ za výkladní skříní, dopsal jsem p. Lorenzovi o sdělení ceny při objednávce většího počtu ex.; zakoupiv si knížku, poznal jsem, že byl jsem lstivě oklamán jejím autorem, který pod názvem Esperanto vnucuje kupujícímu jeden ze systémů Ida — stále „zdokonalovaného“ (slovo stále vyznačuji, neboť p. Kajš nechce, ač to dobře ví, přiznati před veřejností, že za několik roků dle usnesení autorů Ida, budou v základu Ida již zase provedeny změny a to ovšem pro vydavatele informačních tiskopisů a pomůcek k učení se Idu — a znovuučení se jemu — musí znamenati finanční i moralní pohromu!) Dopsal jsem tudíž f-ě Lorenzově 28./VI. 1914 doslovně toto:

„Pročetl jsem včera Vaše vydání kolibřího slovníčku publikovaného pod názvem Esperanto, leč musím s politováním sděliti že jsem bezmála stal se obětí nesvědomitého autora, když chtěl jsem našim předplatitelům toto dílko jako premii rozeslati. Odvolávám obsah svého posledního dopisu, neboť jest publikace ta zcela bezcenná, jest pouhou napodebeninou a plagiátem Esperanta, jehož jména však autor zneužil, aby veřejnost oklamal nápisem. Obsahem však naprosto neodpovídá tomu, co dnes Esperantem skutečně jest, tomu, co jedině má na toto jméno právo — dílu Zamenhofovu. Lituji, že snad i Vaše ctěná firma stala se obětí nesvědomitosti p. Kajšovy, který, ač dobře ví, že zneužití takovéhoto jména pro projekt stále reformovaný a v praksi zneužívaný jest nešlechetné, přec odvážil se nejen na knížce, ale i v reklamní části „Panamského průplavu“ dáti název svým spiskům „Esperanto“. Dnes veřejnost esperantská (více než 2000 spolků se 100 časopisy) jest přímo úmyslně klamána podobnou nešlechetností několika lidí, kteří chtějí své náhledy vnutiti pod falešným jménem (na pásce kolibřího slovníčku jest pouze „Esperanto“!!) a kteří spoléhají se na neinformovanost nakladatelů.

Prosím, abyste si neobtěžoval nahlédnouti do oběžníku současně zasílaného, abyste poznal, jak zneužito bylo Vaší důvěry autorem dílka, který pomocí Vašich prostředků — aniž by snad bylo s Vaším vědomím — klame českou veřejnost. Nepochybuji, že i z mnoha stran českých Esperantistů dostanete upozornění podobného obsahu a dovoluji si uctivě Vás žádati v zájmu věci esperantské, abyste laskavě po důkladnějším prozkoumání věci zjednal nápravu, což bude zajisté rovněž v zájmu Vaší ct. firmy.

Kdyby místo této bezcenné, nikým neupotřebitelné publikace byl vyšel slovníček skutečného Esperanta, pak bychom ani minutu se nerozpakovali doporučiti ho všem českým Esperantistům sdruženým v 50 klubech a všem našim předplatitelům. Ovšem tuto publikaci ...? leč doufáme, že bude lze věc napraviti“.

Asi za týden došla odpověď:

„Potvrzuji příjem ct. dopisu Vašeho, který mne velice nemile překvapil; zašlu jej panu Kajšovi ku přečtení. Té doby nemohu s dílkem nic dělati, musím hleděti malý náklad rozprodati a až tak se stane, požádám Vás za přepracování. Neračte tedy knížečku na veřejnost zbytečně zlehčovati. Opakuje svou prosbu v ohledu tomto, znamenám s dokonalou úctou J. Lorenz."

Konečně dne 10./VII. v Národním Obzoru pod názvem „Nekalé zbraně" zneužil p. Pavel Žakavec (p. Kajš či p. Chalupecký?) mého dopisu, uveřejniv jej „opravený" a seškrtaný dle potřeby. Opovažuje se dokonce tvrditi, že ani Zamenhof nemá práva zakazovati Idistům užívání slova Esperanto, svého pseudonymu, jež jest dnes vlastním jménem jeho díla.

Považoval jsem tudíž za nutné zaslati panu Lorenzovi toto vysvětlení:

„11./VII. 1914. Dopis můj, kterým dovolil jsem si sděliti Vám, velectěný pane, jak nešlechetně oklamal Vás autor kolibřího slovníčku nesoucího pásku s nápisem Esperanto, kteréž jméno jest vlastním jedině dílu Zamenhofovu (jeho původní pseudonym), dopis, z něhož ani písmeny neodvolám, ten stal se v jeho ruce předmětem útoku v Národním Obzoru (dne 10./VII. 1914).

Pisateli neslušného článku „Nekalé zbraně" neodpovídám. Zaslal jsem však redakci N. O. dopis s tímto obsahem:

Ke článku „Nekalé zbraně" v č. 31. „N. O.", jehož autora nepovažuji za hodna odpovědi, neboť nejsem přítelem polemik s lidmi uchylujícími se k nepravdám, musím v zájmu pravdy poznamenati, že dopis můj, citovaný ve jmenovaném čísle, jest falšován. Hlavní body, které jsem akcentoval jsou vypuštěny, aby vzbudilo se zdání, že můj údiv nad nešlechetným jednáním p. Kajšovým jest líčený. Mimo jiné cituji z kopie svého dopisu jednu větu; čtenář pozná, jak má se dívati na charakter pana Žakavce.

Nepsal jsem: „Dnes veřejnost esperantská jest přímo veřejně klamána podobnou nešlechetností několika lidí, kteří spoléhají se na neinformovanost nakladatelů".

Ale — dle kopie — psal jsem: „Dnes veřejnost esperantská (více než 2000 spolků se 100 časopisy) jest přímo úmyslně klamána podobnou nešlechetností několika lidí, kteří chtějí své náhledy vnutiti pod falešným jménem (na pásce kolibřího slovníčku jest pouze „Esperanto" !!) a kteří spoléhají se na neinformovanost nakladatelů".

Ovšem, bylo nutno potlačiti fakt o rozšíření Esperanta jakož i zamlčeti trestuhodnou literární krádež pseudonymu Zamenhofova „Esperanto", jímž svůj vynález nazval. Každý má právo stavěti vzducholodi (analogicky: pokusiti se o sestavení pomocného jazyka mezinárodního), ale nikdo nemá práva své pokusy nazývati „Zeppelin" (obdobně „Esperanto").

Uchyluje-li se hrstka 5—10 stoupenců Ida u nás ke krádeži jména „Esperanto" jen aby na svůj projekt upozornila (zbraň věru nekalá), pak svědčí to o naprosté bezcennosti jejich pokusu, který by na vlastních nohou daleko do světa nedošel.

Dopis zaslal jsem 11./VII. redakci „Nár. Obzoru" doporučeně. Prosím o uvážení, že i v případě, kdybych o knížce nyní v našem časopise vůbec se nezmiňoval, jest zde ještě celá řada jiných časopisů, které — zvláště po tomto jednání pana Kajše

k tomu všemu mlčeti nebudu; již v jednom četl jsem pod zcela oprávněným názvem „Podvod“ kritiku zaslouženou....“

*

Přál bych si, aby tím byla zde věc vyřízena a aby čeští Esperantisté věděli, že mají právo a povinnost informovati oklamanou vydavatelskou firmu, která nemohla tušiti, jaký koukol vyklíčí na poli propagandy mezinárodního jazyka. Kdyby byla jmenovaná firma tušila, že vstupuje ve spojení se zástupcem několikačlenné hrstky stoupenců bezcenných plagiátů a nikoliv se světovým hnutím esperantským, čítajícím dnes na statisíce a milliony členů, byla by nepochybně p. Kajšovi odpověděla ihned jak zaslouží, ovšem — triku tak záludného ihned neprohlédla.

Red.

*

Karaktero de Idisto.

Mankon de honesta karaktero montras la ĉefoj de la kontraŭesperanta movado idista: Antaŭ nelonge eldonis firmo Lorenz en Třebíč (Moravio) miniaturan libreton (boh.-idistan vortareton) kaj la aŭtoro (s-o Kajš) ne hontis titoli ĝin: „Esperanto-Ido“. Sur specialaj banderoletoj paradas sole titolo: „Esperanto, vortareto internacia-bohema“. Jen klara pruvo, ke la aŭtoro fidas je trompiĝo de la aĉetanto kaj per falsa titolo volas entrudi sian fuŝverkon mem al Esperantistoj, kiuj supozas vidi en la elmontra fenestro novan esperantaĵon. Tio ĉi plej bone pruvas, ke Idistoj hontas pri la sensignifa kaj neatentata nomo de sia projekto, por kiu ili devas ŝteli eĉ la nomon „Esperanto“, kiu ĝin rekomendu! La sama eldonejo anoncas idistan gramatikon de ĝi eldonitan: „Esperanto, lernolibro de lingvo internacia“. Ĉu la aŭtoro de Esperanto povis supozi antaŭ 27 jaroj, ke venos tempo, kiam lia verko donacita al la mondo fariĝos viktimo de tiaj personoj? Kaj ĉi tiuj „samideanoj“ ne hontis proponi al Esperantistoj traktadon pri la lingvaj demandoj! La bohema esperantistaro uzos sendube la okazon por informi eldoninton de la supre nomitaj verketoj pri la trompo kaj se li ŝatas la bonan famon de sia nomo, li certe scios, kiel agi kontraŭ la aŭtoro — kies viktimo li mem fariĝis.

KORESPONDANTOJ (*daŭrigo*):

En tiu ĉi rubriko estas publikigataj senpage adresoj de alilandaj samideanoj, kiuj serĉas korespondantojn inter Bohemoj. Atentigu pri tio viajn amikojn!

(*Mallongigoj*: int. = interŝanĝas; il. k. = ilustritaj kartoj; p. m. = poŝtmarkoj; bdf. = gluu la p. m. bildflanken; sgm. = sigel-m.):

*106. S-o Meskó László, ***Miskolcz***, Zsolcai kapu 50. Hungarujo, (p. m.). — *107. S-o Stern Károly, ***Miskolcz***, Rudolf laktanya, Hung., (il. k.). — *108. S-o Erdélyi István, *Diosgyör-Vasgyár*, Hung., (il. k., p. m.). — *109. S-o Eug. Feldmann, *Ungvár*, Kossuth-tér 12. Hung. (il. k., p. m.). — *110. S-o Jos. Sergejev, ***Astrakano***, Unua baldakinskaja 38. Rusujo (il. k., let., p. m.), int. ĵurnalojn, gvidlibrojn, gvidfoliojn esp. — Por 50. p. m. sendos 50. rusajn p. m.; bdf.). — *111. S-o Joh. Aggstaller, gimnaziano, ***Regensburg*** *I.* Poste rest. Bavarujo (il. k. kun gejunuloj). — *112. S-o Félix Arenillas, ***Bilbao***, Apartado 174. Hispanujo. — *113. S-o J. Friedrichsmann, ***Narva***. Ruslando (int. rusajn p. m. Romanov kontraŭ ĉiulandaj). — *114. S-o Béda David, universitata oficisto, ***Kolozsvár***, Egyetem. Hungarujo. — *115. S-o Walter Meihiner, ***Leipzig***. Dresdnerstr. 18./III. l. Germanujo.

La sekvantaj adresoj (sen*) estaj ĉerpitaj el aliaj gazetoj:

Porlamar, Sur 2. n-o 37. Insulo Margarito, Venezuelo, Eleuterio, Rosario Campo (il. k., p. m.). — S-o J. L. Stilwell, ***Coventry***, 76. Bradway, Anglujo (int. ĉiulingvajn gazetojn, precipre pri arĥeologio, antikvajoj, filologio). — S-o N. G. Bevan, ***Sydney***. N. S. W. Upper Spit-rd., Mosman, Aŭstralio (kor. pri hipnotismo, magio, fotografado; int. fot., p. m.). — S-oj R. Flint, W. Hatfield kaj L. Baxter, ***Khartoum***, War Office. Sudan, Afriko. (il. k., p. m.). — S-o Charles Westgate, ***Gibraltar***, 24. New Mole House (il. k., fot.). — S-o Arun Chandra Rey, ĉe Baku Mihir Math Roy, ***Bankipur***. P. O. Moradpur, Hindujo (kor.). — S-o H. C. Parks, ***Simla***, „Fern's Hollow" Hindujo (kor. per mallongaj let.). — S-o K. Shirosaki, Kojimachi, ***Tokio***, P. O. Box 3. Japanujo (sekretario de interŝanĝa asocio Azia por il. k., let., p. m.). — S-o J. H. Krestanov ***Grenoble***, Poste Rest. Francujo. (int. esp. gazetojn). — „Scauting": Skoltoj skribu al s-o André Le Strat, éclaireur de France, 28. rue de Joubert, ***Angers***, (nunjara kongresejo de skoltoj). — S-o Humberto Chaves, ***Rio de Janeiro***, str. Manoll Victorino 575. Piedade (int. portretojn kun samideanoj). — F-ino Nelly Schewelius, ***Gefle***, Norra Kopmang 33. Svedujo. (il. k.). — Gelernantoj de e. kurso en ***Mexiko***, 4 a del Factor, 47. Altos D. F: Meksikujo (dez kor., kun ĉiulandaj E-oj)

PRÁVĚ VYŠEL I

KÜHNL-PROCHÁZKA:

SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ

288 stran 25.000 hesel K 3·60.

zastaviti se halti; (*nad čím*) ekmiri pri io
zastávka halto; (*místo*) haltejo
zástavní garantia; hipoteka; **z. list** garantia bileto; hipoteka bilo; obligacio
zástěna ekrano
zástěra antaŭtuko
zastihnouti trafi; atingi; trovi
zastíniti ombri; (*fig.*) superi
zastoupení reprezent-o; -ado; **v z.** kiel (anstataŭanto) substituanto
zastoupiti (*cestu*) bari (eniri en) la vojon; (*býti zástupcem*) reprezenti; substitui; anstataŭi (iun); (*právn.*) pledi por iu; defendi iun
zastrašiti (for)timigi
zastrčiti enigi; enŝovi; enmeti; ŝovi post ion; (*do kapsy*) enpoŝigi; (*dveře*) rigl(oferm)i
zástrčka riglilo
zastřeliti mortpafi; pafmortigi; (*popraviti*) pafekzekuti
zastříti vuali; kovri; kaŝi
zastuditi malvarm-igi; per -o difekti; **z. se** -umi [amaso
zástup amaso da; hom-, popol-
zástupce anstataŭanto; substituanto; reprezentanto; (*právní*) advokato; (*státní*) prokuroro; (*chefa, firmy*) prokuristo
zastupitelství reprezentado
zastupitelstvo reprezentant- [aro
zástupka (*sloh.*) tropo
zasunouti v. **zastrčiti**
zásuvka tirkesto
zasvětiti konsekri; sanktigi; (*do čeho*) ensekretigi; detale informi pri io; (*náb.*) inicii
zásvit brileto; ekbrilo
zasytiti (tute) satigi [nutrejo
zásyp ŝutnutraĵo; (*místo*) ŝut-
zasypati ŝutplenigi; surŝuti; (*fig.*) superŝuti; (*zvěři*) ŝuti (nutraĵon)
zašantročiti forŝakri
zašiti kunkudri; kudroripari; enkudri
záškodník marodero
záškrt difterito; krupo
zaškrtiti premsufoki
zaškrtnouti strek-marki, -signi; (*na kraji*) randstreki
zašlapati pied-enpremi; -dispremi; (*čistou podlahu*) per botoj malpurigi
zašlý pasinta; (*o barvě*) paliĝinta; (*o písmu*) defrotita, frotdifektita
zašněrovati (en)laĉi
zašpendliti kunpingli; pinglofiksi; -kunigi
zašpičat-iti pintig-i; **-ělý** -ita; pint-a, -oforma [malami i[illegible]
zášť malamo; **míti z.** (*na koho*)
záštita protekt-o; -ado; patroneco; protektorato; aŭspicioj; egido; (*chránidlo*) ŝirmilo
zatáč-eti turn-i; **-ka** -o; (*dráhy*) voj-kurbiĝo; -turniĝo
zatáhnouti (*zač*) ektiri (ion, je io); (*vtáhnouti*) entiri; (*zavléci*) for-, en-treni; (*síť*) kuntiri; **z. se** (*mraky*) nubokovriĝi; (*o sudu*) ŝvelkuntiriĝi
zatajiti sekretigi; kaŝi; (*dech*) reteni
zatarasiti bari; barikadi
zatékati flui (guti) post (en) ion; traguti; (*otéci*) ŝveli
zatemn-iti malhelig-i; malklarig-i; mal-, sen-lumig-i; malserenig-i; **-ělý** -ita

Zasílá se pouze za hotové. Se slevou (po K 3·10) jen členům spolků B. U. E.

Adr.: *Red. „Časopisu Českých Esperantistů“* Praha II. Dittrichova ul. 7

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.